

# MAKABRA RAKONTETO

*Artikolo publikigita en la revuo ADISTA EKSTER LA TEMPLO la 16an de oktobro 2010*

La sadukeoj bone aranĝis la kaptilon kien faligi Jesuon. Ili ne aŭdacas lin alfronti en la doktrina aŭ politika kampo ĉar ili povus esti venkitaj. Jesuo, fakte, jam silentigis per siaj respondoj la ĉefpastrojn, la skribistojn kaj la pliaĝulojn (Lk. 20, 1-8) kaj li lasis senvortaj eĉ la batalpretajn fariseojn, kiuj *“miris pro lia respondo, kaj silentis.”* (Lk. 20,26).

Momente ili ne povas lin elimini ĉar Jesuo havas grandan sekvantaron inter la popolamaso, kaj ili igus lin martiro, tiel la sadukeoj decidas lin altiri en glitigan terenon el kie, kiam li ekfalos, la kandidata Mesio havos malfacilaĵojn por sin levi, nome la ridindecon kaj la diskrediton.

La aristokrata pastra kasto de la sadukeoj, kiu havis ne nur la religian povon sed ankaŭ kaj super ĉio tiun ekonomian, jam supersatiĝis pri tiu ĉi predikanto kiu allogas la popolamason kaj kiu riskas endanĝerigi la prestiĝon de la religia institucio. Pro tio kelkaj sadukeoj alproksimiĝas al li kaj per tia malveremo kiu markas la kurian lingvaĵon sin turnas al li vokante lin respektoplene *“Majstro”*, tamen ili ne intencas lerni sed ja ili intencas diskrediti Jesuon. La afero kiu plej interesas la sadukeojn estas tiu nova herezo subtenata de iliaj kontraŭuloj, la fariseoj, kaj nun subtenata eĉ de Jesuo: la resurekto. Tradiciistoj kaj konservativuloj, la sadukeoj ne agnoskas alian Skribon krom la Torao, la unuaj kvin libroj de la Sankta Biblio, kaj ili ekskludas de sia doktrino kaj la instruon de la profetoj kaj la morojn transprenitajn de la fariseoj. Kaj ĝuste sin rilatigante al Moseo, al la normoj rilatantaj la leĝon pri la levirato (*el levir/bofrato*), ili priridas la doktrinon de la resurekto. Fakte, la leĝo pri levirato antaŭvidis ke la bofrato de virino vidviniĝinta kaj sena je gefiloj estus devigata gravedigi ŝin. La naskiĝinta filo havus la nomon de la forpasinto, tiel ke estu certigita al li la posteularon (*“por ke ne malaperu lia nomo en Izrael.”*, Read. 25,6; Gen. 38,8). Laŭ la tiuepoka kulturo la geedziĝo havis nur la celon certigi idaron al la viro, kaj la virino utilis nur por naski filojn.

Referencinte al la famekonata historio pri Sara, la malfeliĉa edzino al kiu mortis eĉ sep edzoj la vesperon mem de la geedziĝo (Tobit 3,8; 6,14), la sadukeoj kredigas veraĵo la makabran rakonteton pri sep fratoj kiuj mortis ĉiuj sen sukcesi havigi al si filon de tiu kiu estis la edzino de ĉiuj sep. Pri la virino la sadukeoj tute ne interesiĝas, sed ili nur deziras scii al kiu forpasinto, post la resurekto, ŝi estos destinita por senmortigi pere de filo lian nomon mem.

La sadukeoj tiamaniere klopodas primoki Jesuon kaj la resurekton, kontraŭmetinte ĉi lastan aferon al tio kion skribas Moseo en la libro Readmono (Read. 25,5-10) Laŭ ili, fakte, estas neeble kredi je la resurekto ĉar tiu ĉi doktrino kontraŭas tion kion ordonis Moseo.

**Jesuo respondas ke la vivo de la resurektintoj ne dependas de la rilato inter geedzoj, sed ĝi devenas rekte de la povo de Dio, ĝuste kiel tiu de la anĝeloj, cititaj de Jesuo ĝuste ĉar la sadukeoj ne kredis je ili (Agoj 23,8).**

**Al la sadukeoj kiuj sin fortigis pere de la aŭtoritateco de Moseo por sin oponi al Jesuo, li replikas ĝuste sin rilatigante al Moseo, montrante al ili tiamaniere kiom limigita estas ilia legado de la Sanktaj Skriboj, kaj li rilatiĝas al la respondo kiun Dio donis al Moseo en la epizodo pri la flama arbeto (‘‘La Sinjoro estas la Dio de via patro, la Dio de Abraham, la Dio de Isaak, kaj la Dio de Jakob.’’ El. 3,6; Lk. 20,37). La dirmaniero ‘‘Dio de Abraham...’’ ne indikas la diaĵon adorata de Abraham kaj de la aliaj patriarkoj, sed ĝi indikas la Dion kiu ilin protektas. Esti prenita sub la protekton de Dio signifas havi sian vivon mem, kaj la fidela Dio ne permesas ke mortu tiujn kiujn li amis, ĉar Jesuo deklaras, ‘‘Li estas Dio ne de mortintoj, sed de la vivantoj, ĉar ĉiuj vivas al Li.’’ (Lk. 20,38) Por Jesuo la resurekto ne estas reveno al la antaŭa vivo, sed ĝi estas nova vivo kiu fontas el la povo de la Kreinto, la Dio kiu ne revivigas la mortintojn (Dio de la mortintoj) sed kiu komunikas sian vivon mem al la vivantoj (Dio de la vivantoj) por ilin eternigi. Fakte la morto por Jesuo ne nur ne interrompas la vivon, sed ĝi estas tio, kio permesas al la vivo sin montri laŭ nova formo, plena kaj eterna.**

*Alberto Maggi Osm*